

# Esperanto-Brno

*Esperanto-Brno - Kluba prelego 29.5.2013*

## Historio de Brno

*Věra Podhradská*

Historio de Brno komenciĝas en la frua mezepoko, la unua skriba mencio devenas el la jaro 1091. Konstanta homa setlejo ĉi tie jam ekzistis longan tempon antaŭ tiu ĉi dato, rekta antaŭanto estas slava opidumo Staré Zámky ( Malnovaj Kasteloj). La unuaj atestoj pri homa ĉeesto sur teritorio de nuna Brno jam devenas el la pratempo.

### **Plej malnova opidumo**

La plej malnova atesto pri homa setlejo en Brno estas permane prilaborita ŝtono, trovita sur Ruĝa monteto (Červený kopec) proksimume 7-cent-mil-jara. En la teritorio de Brno vivis ankaŭ **homo Kromanjona** (člověk kromaňonský). Grava trovejo kun setleja postsigno de pli malnova ŝtonepoko estas Stránská skála, kie estas ankaŭ opidumo el pli posta epoko (eneolitiko). Komence de pli nova ŝtonepoko (neolitiko) estis teritorio de Brno setlata senĉese, en diversaj epokoj en la pratempo kaj la tutan mezepokon ĉi tie ekzistis centraj restadejoj. Plua grava arĥeologia trovloko estas ekz. Bystrc, Hradisko u Obřan, Staré Zámky u Líšně, Holásky, Brno Maloměřice, Řečkovice, Kotleářská ul. Riĉaj arĥeologiaj trovejoj estas tuta teritorio de Brno, ĉar tiu ĉi teritorio estis tre konvena al setlado (milda klimato, fekunda grundo, komunikado ktp). Ekz. dum konstruado de universitata kampuso en Bohunice estis en la jaro 2007 trovitaj arĥeologiaj restaĵoj, versimile de fortikaĵo el plinova ŝtonepoko 6 - 8 mil jaroj malnovaj. En teritorio tiel nomata historia centro de Brno estis eneolitika setlejo el pli malnova ĝis posta bronza tempo kaj halŝtato. Stabila setlejo en tiu ĉi teritorio komenciĝas en la 12-a jarcento en suda parto - ie inter la nuna placo de Libereco (nám.Svobody) kaj la strato Stacidoma (Nádražní). En lasta tempo estis akiritaj ankaŭ dokumentoj pri uzado de teritorioj en sudaj deklivoj ĉe la strato Pekařská en la sama tempo. Granda pratempa opidumo komencante de eolitiko estis registrita ankaŭ en teritorio ĉirkaŭ la strato Dornych.

En la 2-a jarcento greka geografo Klaŭdio Ptolemeo menciis pri komunumo Meliodunon, verŝajne en teritorio de la nuna Brno.

### **Mezepoko**

Dum la 8-a kaj 9-a jarcentoj plenumis gravan funkcion setlejo Staré Zámky ĉe Líšeň, administra centrejo de la Grandmoravia regno. Certan signon en tiu ĉi tempo

havis ankaŭ setlejo versimile sur insuleto en la rivero Svatka en regiono de la nuna Staré Brno (Malnova Brno) – proksimume en stratoj Křížová, Křidlovická, Ypsilantiho, eble jam en la 1-a duono de la 10-a jarcento.

Setlado daŭras plu, sekve ĝi estiĝas eble jam en la 1-a duono de la 11-a jarcento. Unue sur maldekstra bordo de la rivero Svatka estis konstruita rotondo, la restaĵoj de ĝi estis trovitaj en areo de aŭgustiniana monaĥejo en Mendelplaco. Nur post du rekonstruoj en la 12-a aŭ 13-a jarcentoj, en la jaro 1324 fondis ĉi tie Elizabeta Riĥenza (Eliška Rejčka) la nunan preĝejon de Ĉieliro de Virgulino Maria (Nanebevzetí Panny Marie), kiu servis al nove fondita monaĥejo de cistercianinoj.

Oni supozas, ke en Staré Brno estis grava centro de premisla ŝtato post regado de Moravio de tiu ĉi dinastio en la jaro 1019. En la 2-a duono de la 11-a kaj la 1-a duono de la 12-a jarcento ĉi tie setlis apanaĝaj princoj.

El la jaro 1091 estas la unua certa skriba mencio en la kroniko de Kosmas. Kredinda estas ankaŭ indikoj en t.n. dokumentaj falsaĵoj. En la 12-a jarcento mezepoka aglomeracio, kiu enhavigis krom la burgo kaj setlejo en areo de la monaĥejo en Malnova Brno ankoraŭ subkastelan domaron sur la dekstra bordo de Svatka, disvastiĝis en deklivoj sude de Pekařská strato kaj ĉefe en sudajn partojn de pli posta urbo. Tiam estis ankaŭ konstruita ununava preĝejo de sankta Petro kun kriptoj.

Palisada trogo (palisádový žlab) en la domo Petrov 8 (episkopejo) ne eliminis ekziston de formodomo. Ĉirkaŭ la jaro 1200 venis germanaj (aŭstria) kaj valonaj setlantoj. Frapante disvastiĝis setlado en la 30-aj jaroj de 13-a jarcento. Tiu ĉi evoluado kulminis per ekesto de institucia urbo eble en la 30-aj jaroj de 13-a jarcento. Ĝia juĝa ordono deduktiĝas de aŭstria urbo Enže kaj Vieno.

En jaro 1243 la reĝo Venceslao (Václav) la 1-a, donis urban privilegion. Burgon Špilberk verŝajne fondis en la 70-aj jaroj de 13-a jarcento Premislo Otakato (Přemysl Otakar) la 2-a. Jam antaŭe estis konstruita ŝtona murego. En la jaro 1292 ricevis la urbo rajton baloti vilaĝestron. En la jaro 1349 fariĝis Brno konstanta sidejo de moraviaj markgrafoj. Kune kun la urbo Olomouc estis Brno la plej signifoplena moravia urbo, kunsidis ĉi tie eĉ landa tribunalo. La teritorio ĉirkaŭita per muregoj havis preskaŭ 37 ha, kvanto da loĝantoj en lucemburga tempo estis preskaŭ 8 mil.

Husanaj bataloj influis la urbon Brno en la jaroj 1428 kaj 1430. Brno restis dum la tuta tempo bastiono katolika, al tio kontribuis lia plejparte germana karaktero. La husanoj la urbon ne konkeris, sed tre suferis Staré Brno kaj aliaj pli proksimaj vilaĝoj kaj periferioj. Jam en la unua duono de 13-a jarcento aperas la unuaj masonitaj burĝaj domoj, kvankam ankoraŭ dum kelkaj dek jaroj poste estis domoj plejparte lignaj. Sed de tiu tempo jam la urbo komencis konstrui nur masonitajn domojn, do en la 14-a kaj 15-a jarcentoj havis Brno masonitan karakteron.

## **Novepoko.**

En la jaro 1641 post konkero de la urbo Olomouc fare de svedaj armeoj, Brno fariĝis

vera ĉefurbo de Moravio. Finon de la konflikto de ambaŭ urboj metis markgrafo kaj imperiestro Jozefo la 2-a, sed nur en la jaro 1782, kiu aljuĝis la rajton por definitive signi urbon Brno kiel ĉefurbo.

Septembre 1643 kaj poste en la jaro 1645 estis Brno malsukcese sieĝata de 18 mil svedaj soldatoj de generalo Torstenson, kiu intencis uzi la urbon Brno kiel bazon por finala atako al Vieno. Pli poste al Torstenson armeo aliĝis ankoraŭ 10-mil-kapa armeo de transilvania princo Georgo Rákóczi la 2-a. Dum konkerado la urbon defendis nur 1476 loĝantoj, soldatoj estis duono el ili. Danke al persistemo kaj insisto de defendantoj kaj genia organizado de la franca oficiro Raduit de Souches la svedoj ne sukcesis kaj per perdo de 8 mil batalantoj finis la konkeradon.

Preskaŭ 100 jarojn poste, en la jaro 1742, estis Brno konkerata sensukcese de prusaj armeoj. En jaro 1749 en Brno estis fondita moravia tribunalo kaj politika senato. Industrio komenciĝis jam en la jaro 1763, kiam estis fondita la unua tekstila manufakturo. En la jaro 1777 estis establita brunna episkopejo, kaj estis subalterna al episkopejo en Olomouc.

En la jaro 1805 en Brno tranoktis Napoleono Bonaparte, nome antaŭ grava batalo ĉe Aŭsterlico (Slavkov). Restado de francaj armeoj estis por la urbo tro ŝargâ, konsumis multajn nutroprovizojn, kiuj mankis al la loĝantaro kaj pro tio disvastiĝis diversaj malsanoj.

En la jaro 1817 pere de imperiestra dekreto de Francisko la 1-a estis fondita Muzeo en la nomo de Francisko, hodiaŭa Moravia Landa Muzeo, dua plej granda kaj same dua plej malnova (la unua muzeo en Opava) en ĈR. En la jaro 1839 estis urbo kunligita kun Vieno per trajno. En jaro 1846 estis instalita publika lumigo pere de gazlampoj, en la jaro 1847 estis instalita telegrafo. De la jaro 1850 ĝis la jaro 1949 funkciis supera tribunalo, kun valideco ne nur por Moravio, sed ankaŭ pro Ĉeĥa Silezio.

La 6-an de septembro 1850 estis al Brno aligitaj 19 pluaj katastraj teritorioj kaj areo pligrandiĝis je 1 732 hektaroj por ĝia t.n. (interna Brno) nun Brno-centro. Samtempe Brno estis dividita je 4 memstaraj distriktoj, kaploke estis distriktaj komitatoj kun estroj kaj anstataŭantoj. En la jaroj 1859 - 1864 estis sinsekve detruita preskaŭ tuta urba remparo, el kiu restis ĝis nun kun rekonstruita Mě́nín-pordego nur kelkaj restaĵoj en Husova, Bašty, Denis-parko (Denisovy Sady). Post detruo ekestis granda industria disvolviĝo de la urbo.

Aŭguste en la jaro 1869 ekfunkciis ĉevaltramo. La jaro 1873 alportis la unuan altlernejon en Brno, teknikan instituton. En la jaroj 1881 kaj 1882 estis nove konstruita urba teatro kiel la unua eŭropa teatro lumigita per elektroampoloj de T.A. Edison, tuj sekvantan jaron estis fondita na unua Librovendejo de Joža Barvič. En la jaro 1899 ekfunkciis Tehníka Altlernejo (Vysové učení technické). En la jaroj 1896 - 1916 okazis en la historia urbocentro multampla asanacio, detruitaj estis 238 domoj kaj konstruaĵoj. De la mezo de la 19-a jarcento ĉeĥaj patriotoj intencis establi ĉeĥan universitaton en Brno, sed pro germana komunumo en la urbo ili ne sukcesis.

Kaj jam venis la 20-a jarcento kaj tio jam estas alia afero.